Richard Wagner,

# Funebre kovras la krepusko valon

*tradukita de Antoni Grabowski*

*Ario el la opero "Tannhäuser"*

Funebre kovras la krepusko valon,
etendas nokto nigran la vualon.
Deziras supren flugi la anim',
sed tenas ĝin de nokt-teruroj tim'.
Jen vi aperas , stelo la plej kara!
De malproksimo fluas lumo klara,
disigas ombron ĉarma la radi',
amike montras la vojon al mi.
Ravite, ho vespera stel',
mi vin salutas sur ĉiel';
kaj de fidela mia kor'
ŝin vi salutu en tiu hor',
kiam ŝi flugos de la tero
al anĝelar' en supra sfero.

*Traduko de la Germana poemo "O du mein holder Abendstern" de Richard Wagner en Esperanton de* Antoni Grabowski *(∗1857-06-11 – †1921-07-04).*

*Arg-1014-2054 (2014-05-19 22:51:58)*

*Tiun ĉi kanto-tradukon mi, Manfred Retzlaff, trovis en la libro "Internacia Kantaro", eldonita en 1922 de la eldonejo Ferdinand Hirt u. Sohn en Lepsiko (Leipzig), Germanio. La kantojn kolektis kaj eldonis Paul Bennemann. Pri la tradukinto vidu la retejon* `http://eo.wikipedia.org/wiki/Antoni_Grabowski`.